Konkurso por programistoj:

Pasporta Servo 2

1 Enkonduke

Pasporta Servo estas unu el la plej popularaj servoj de TEJO. Por ke ĝi restu populara kaj altira al gastigantoj kaj vojaĝantaj uzantoj, ni alcelas grandan reformon de PS kiu igos PS-n veran interretan platformon, sen malebligi partoprenon al uzantoj sen aliro al interreto. Ni esperas ke dank'al la reformo ni atingos

- pli da uzeblecoj por uzantoj per la interreta interfaco
- pli efikan redaktadon dank'al interaktiva datenbazo prilaborebla per la gastiganto
- malpli kostan aliron por uzantoj de la interreta versio pro ŝparo de pres- kaj sendkostoj

La projekto "PS2" konsistas el 2 partoj:

1. Reta datenbazo enhavanta la datenojn de la PSanoj, rete prilaborebla.
2. Retejo kiu disponigas aliron al la datenbazo por la uzantoj.

Ĉiuj ĉi-menciitaj postuloj respegulas nian nunan staton de pripensoj kaj *ne nepre* estas "100-%-kondiĉoj". Se iu propono pro alia koncepto ne plenumas unuopajn postulojn, tio ne nepre estas malavantaĝo, se la koncepto estas konvinka.

2 Ĝeneralaj postuloj

Uzebleco

La retejo estu alirebla sen diferenco per diversaj retumiloj kaj sistemoj, respektante la w3-regulojn. Se la grafika koncepto enhavas elementojn kiuj estus obstakloj por uzantoj kun limigita aŭ sen vidkapabloj, estu disponebla alternativa versio.

Uzado de liberaj fontoj

Ĉiuj uzataj komputikaj fontoj estu libere uzeblaj laŭ permesilo de libera programaro kiu estas akceptita de OSI (Open Source Initiative). Ĉi tio por eviti problemojn pri permesilaj kondiĉoj kiuj povus malhelpi disvolvadon kaj por poste ĉion ankoraŭ povi redakti laŭ bezono. Tio precipe koncernas

- litertipojn
- dokumentformatojn
- uzataj CMS/EMS-sistemoj

Dokumentado de la laboro

La programado estu akompanata per priskribo kaj dokumentado tiom detala ke ĝi permesu pluan prilaboron de la sistemoj far alia programisto sen eksterordinara alkutimiĝa peno.

Kopirajtoj

Post transdono de la sistemo, TEJO transprenas ĉiujn rajtojn je uzado, merkatumado kaj modifo de ĉiuj eroj de la projekto. Tio povas okazi pere de tuta transpreno de la kopirajtoj (aŭ per licenso mallimiga al ĉi tiuj celoj, kiu praktike rezultu je sama libereco).

3 Daŭro de la projekto

La projekto disiĝas en pluraj paŝoj:

- Interkonsento pri la detala realigo
- Pretigo de funkcianta datenbazo por provoj kaj testoj
- Pretigo de la reta interfaco

Post la starto de la publika servo, ni postulas 6 monatan garantion por senkostaj korektoj kaj riparoj kaze de nefunkcio de laŭkontraktaj funkcioj.

4 La datenbazo

Ĉefa projektero estas la datenbazo de la gastigantoj. Ĝi principe konsistu el ĉiuj jamaj dateneroj, vidu ĉe: http://www.tejo.org/eo/ps_aliĝilo_form.

Kompare al la nunaj elektebloj, aldoniĝu la jenaj:

- opcio "mi ne volas aperigi mian retadreson, sed estas kontaktebla per la reta mesaĝ-formularo"
- opcio "mi forestas/gastas dum tiu periodo"
- opcio "gasto statistiko": gastigantoj povas rezumi kiu el la registritaj gastoj gastis ĉe ili. Kiel registrita gasto oni rajtas malpermesi "esti statistikita".

Ĝeneralaj ecoj:

- Ĉiu gastiganto havu uzantnomon kaj pasvorton kiu permesas al ŝli mem prilabori siajn datenojn.
- La jam ekzistanta datenbazo kopieblu facile en la novan sistemon
- Ekzistu eblo facile enkopii kaj elkopii datenojn en pluuzebla formato (CSV au simile, aŭ ekzemple jam pretan modelon por la libro en HTML, LaTeX, ODF...)
- El la datenbazo eblu rekte kompili printeblan liston de gastigantoj similstila (ne nepre similaspekta!) al la nuna PS-libreto.

5 La retejo

La retejo ĉefe plenumu la jenajn funkciojn:

Surfaco

- reprezenti/montri la riĉecon de la reto al ĉiuj uzantoj (la publike alirebla parto estu tradukebla al aliaj lingvoj)
- Tiucele ĝi enhavu mondan mapon montrantan ĉiujn lokojn kun gastigantoj kaj registritaj gastoj (en apartaj koloroj/simboloj)
- Estu antaŭvidita loko por anoncoj

Uzantoj

- permesi al registritaj konfirmitaj uzantoj "gasto" aliri la datenbazon kaj ĉiujn

gastigantajn datenojn laŭ la vidigpermesojn starigitaj de ĉiu unuopa gastiganto
- permesi kontakti gastiganton per reta mesaĝo-funkcio
- permesi al gastigantoj aliri siajn datenojn kaj prilabori ilin
- permesi al gastigantoj krei gasto-statistikon
- registritaj gastoj povu elŝuti la printeblan liston en formato pdf. Eblu elŝuti nur parton de la listo, ekz. laŭ lando, regiono, urbo
- komuniki problemojn kun gastoj aŭ gastigantoj al la administranta teamo.

Aldonaj proponoj pri uzant-retaj funkcioj (forumoj ktp) estas bonvenaj. Tamen dum la diskutoj estis konkludo ke funkcioj ne estas deziratai, kiuj permesas juĝi gastigantojn aŭ gastojn (kiel en ebay aŭ aliaj komercaj forumoj). Publike videblaj mesaĝoj al gasto aŭ gastiganto estu redaktebla/forigebla far la administranto kaj la adresita gasto aŭ gastiganto.

6 Temposkemo de la projekto

- 2008-10-26 limdato por proponi projekton
- 2008-10-31 decido pri la akceptita projektoj
- 2009-01-01 la datenbazoj (gastigantoj, gastoj, alirpermesoj) pretu por eksperimenta plenigo
- 2009-02-01 la datenbazoj pretu por definitiva prilaboro. La retejo evoluiĝu
- 2009-03-01 la retejo eniru eksperimentan periodon
- 2009-04-01 la retejo pretu por transdono al publiko.

(Ĉiuj eroj de la skemo povas konsense esti reordigitaj laŭ bezono / praktikaj aspektoj)

7 Plua procedo

Ni invitas ĉiujn interesitajn programistojn aŭ programistajn teamojn sendi siajn proponojn ĝis la 22a oktobro 2008 al la oficejo de TEJO. En la propono estu:

- detala priskribo de la proponita solvo: uzataj CMS/EMS-sistemoj, funkcioj, uzataj datenbazsistemoj
- servilaj postuloj (php-versio, MySQL-versio, stokospaco)
- planita daŭro de la programado
- entutaj kostoj kun indiko de planataj programhoroj

Ni eksplicite kuraĝigas kontakti nin por pridiskuti eventualajn malklaraĵojn, detalojn ktp. **antaŭ** sendi la finan proponon – bv. adresi viajn mesaĝojn al gregor (ĉe) tejo.org.

Ni antaŭĝojas viajn proponojn

Gregor Hinker

nome de la Estraro de TEJO